

## & Jupulino:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1073 paŝoj. Verkis Vladimír Gazda (Frenezetaĵoj, Bratislava 1992). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

### (#Melodio:

<1,6:29> (

/mi mire redo dodo; dodo dore mi; mimi mire mire mimi; soso fami mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×37 )+

### (Strofoj:

'1 En montaro en dometo ; ĉe la vilaĝfino ; vivis, jen, geedza paro ; juna kun filino,

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'**.)

'2 knabineto belstatura, ; ĉarma en vizaĝo, ; knabineto milsemajna – ; do en tiu aĝo, .....

'3 kiam oni ne plu emas ; vivi en soleco, ; sed interesicĝas pri la ; dua homa speco. ....

'4 Ruĝan jupon ĉiam porti ; ŝatis la knabino. ; Tial ŝin la vilaĝanoj ; nomis Jupulino. ....

'5 Iun tagon – estis ĝi jam ; ĉe la semajn-fino – ; ŝi preparis sin zorgeme ; iri al avino, .....

'6 kiu en domet' soleca ; vivis en arbaro, ; iam-tiam vizitata ; de la paren caro. ....

'7 Nun sepdekan naskiĝtagon ; festos la avino, ; kaj do korbon da bakaĵoj ; kun botel' da vino .....

'8 la patrin' al la knabino ; en la manon donis ; kaj por ke ŝi plensukcesu, ; jene ŝin admonis: .....

'9 "Paŝvojetojn evitadu, ; al la voj' vin tenu, ; por ke vi sekure al la ; avineto venu! .....

'10 Tuj transdonu la korbeton ; kaj gratulu bele ; kaj revenu tuj, dum estas ; en arbaro hele." .....

'11 Jupulin' la korbon prenis ; kaj adiaŭ diris ; kaj la vojon al l' avino ; brave si ekiris. ....

'12 Ŝi rapidis, ke svingiĝis ; ŝia ruĝa jupo. ; Kaj subite ekaperis ; antaŭ ŝi – jen – lupu! .....

'13 – aĉa, hirta, malgrasega, ; kun dentare'danĝera, ; timegiga, granda, monstra – ; vera best' infera. ....

'14 Ĵetis Jupulin' la korbon ; kaj forkuri volis, ; sed la lupu ŝin hom-voĉe ; jene alparolis: .....

'15 "Trankviliĝu, Jupulino, ; timi vi ne devas –" ; diris li kaj la falintan; korbon al ŝi levas. ....

'16 Jupulino fulmrapide ; venkis sian miron. ; "Kian vi, do, lupu, havas ; kontraŭ mi deziron? .....

'17 Ĉu vi volas vinon trinki, ; manĝi bakaĵeton – ?" ; "Ne, mi havas pri alio ; al vi unu peton. ....

'18 Mi ne estsas tiu lupu ; el infan-rakonto, ; kiun vi ja bone konas; por mi estus honto .....

'19 senkompate nun formanĝi ; knabinetontian." ; – kaj ridete li ekmontras ; dentegaron sian. ....

'20 "Mi ne estas best', sed homo, ;  
ensorĉita princo, ; kondamnita esti lupo  
; kun aĉega grinco." .....

'21 "Kaj ĉu tia resti devos ; vi ĝis via  
morto?" ; "Ne. Ŝanĝiĝi tute povus ; mia  
aĉa sorto .....

'22 se knabino iu mian ; plagpon  
ekkomprenus ; kaj min – aĉan beston-  
kisi ; ŝi ne abomenus. ....

'23 Ŝia kiso rompus tuj la ; forton fi-  
magian ; kaj rehavis mi denove ;  
homan bildon mian." .....

'24 Ekkompatis Jupulino ; lupon la  
mizeran ; kaj eksentis bedaŭregon ; por  
li fortan, veran; .....

'25 la okulojn fermis ŝi ; por venki la  
malplaĉon ; kaj kiseton treme donis ; al  
li sur buŝaĉon. ....

'26 Kiam ŝi l' okulojn poste ;  
remalfermis plene, ; pro surprizo ŝi  
grandega ; preskaŭ falis svene: .....

'27 ne plu staris tie lupo ; kun sovaĝa  
grinco – ; antaŭ ŝi nunfakte staris ; bela,  
juna princo, .....

'28 ŝin rigardis dankoplene – ; ŝi nur  
plue miris – ; kaj per voĉo dolĉasona ;  
jenon al ŝi diris: .....

'29 "Dankon, kara belulino, ; por la ag'  
bonfara. ; Sed ĉar mi ne volas resti ;  
rekompenc-avara .....

'30 kaj prezenti kiel dankon ; al vi  
nuran dirojn, ; mi nun volas tuj plenumi  
; al vi tri dezirojn: .....

'31 Kion ajn deziros vi, ĝi ; venos en  
momento, ; la dezirojn mi plenumos ;  
via je kontento." .....

'32 Alrigardis Jupulino ; princon nian  
danke ; kaj komencis lin esplori, ; taksi  
ĉiuflanke: .....

'33 altstatura estis la kaj ; forta kaj  
larĝbrusta, ; ĉio ŝajnis ĉe li esti ; plej  
perfekta, ĝusta. ....

'34 "Ne hezitu, belulino, ; vere mi  
disponas ; pri la povo, kiu ĉion ; al  
petanto donas. ....

'35 Diru, kion vi deziras?" ; li ŝin  
kuraĝigis. ; Sed rigardon sian plue ; ŝi  
nur al li ligis. ....

'36 Tiam io trapenetris ; tute ŝin,  
ĝisoste, ; ŝi la princon alridetis, ;  
eksuspiris, poste .....

'37 la rigardonterenklinis ; kaj ekflustris  
ĝoje ; "Mi deziron havas solan, ; sed  
tiun – tro foje!" .....